

esperanto gazeto

50

DE INTERNACIA INSTITUTO POR OFICIALIGO DE ESPERANTO




MAJO 1971




EL LETEROJ AL LA REDAKCIO



KERNAVE



RIETAVAS



doj ne havas urbajn blazonojn. Mi deziras ĝustigi, ke en Litova SSR la urboj, grandaj kaj malgrandaj, nun ĉiuj havas siajn blazonojn. Multaj el ili havis blazonojn dum la Mezepoko, aliaj havas nove inventitajn. Por pruvi mi sendas kelkajn desegnaĵojn pri ili.

Vytautas Blauzdys
Litovio, Sovetio

Resp. de la Red.: Koran dankon. La informo estas tre interesa kaj ni volonte publikigas ĝin.

SOMERAJ UNIVERSITATAJ KURSOJ


Mi intencis sendi al la ĵurnaloj komunikojn pri la Someraj Universitataj kursoj en Lieĝo, kiam mi rimarkis la daton: de la 30-a de julio ĝis la 27-a de aŭgusto 1972, kaj mi pensis ke estas tiro frue por tion anonci.

Sed, ĉu ne estas eraro en tiu dato? Plej kore via


P. Marly, Francujo

JUBILEO

Per tiu ĉi numero ni atingas nian arĝentan jubileon. Kiam nia 50-a numero aperas, ni ne povas ne memori la recenzon de Radio-Zagreb pri la apero de la unua numero. Tiam en la kadro de tiu recenzo oni kvazaŭ aŭguris al ni baldaŭan morton, dirante ke »en Esperantujo ofte aperas novaj periodaĵoj, kiuj post kelkaj numeroj ne plu aperas — mortas«. Ni ne scias kial tia ĝenerala konstato estis farita ĝuste kiam oni recenzis NIAN unuan numeron, sed evidente la 5-jara infano ankoraŭ vivas kaj bone fartas. Ni petas la recenzinton de Radio-Zagreb, menci nian jubileon. Dankon!



IGNALINA



PABRADE

BLAZONOJ

En 47-a n-ro de Esperanto-Gazeto mi tralegis tre interesan artikolon pri eŭropaj urbaj blazonoj. En la artikolo oni skribas, ke sovetiaj lan-

NIA KOVRILPAGO: En kiu dialekto ridas la aŭstraliaj birdoj Kukabara? Pli detale sur la mezaj paĝoj.

La geedzoj Matasin kaj unu el iliaj nepoj en sia hejmo.

ESPERANTOGAZETO

ORGANO DE INTERNACIA INSTITUTO POR OFICIALIGO DE ESPERANTO

MAJO ★ N-ro 50 (Jaro VI/5)

Cefredaktoro: T. Sekelj, 11.000 Beograd, Pop Lukina 1.

Aperas 10 foje jare.

Bankkonto: Beogradska udružena banka, 608-620-1-1-32000-10-458 I.O.E. Beograd, Jugoslavio Por Jugoslavio: 608-8-1353-10

ESPERANTO-GAZETO. Izdaje: Meĉunarodni institut za ozvaniĉenje esperanta, Lole Ribara 14, 11000 Beograd.

Odgovorni urednik: Antonije Sekelj, 11.000 Beograd, Kondina 24.

Stampa: Stamparija „Sava Mihić“ Zemun, Maršala Tita 46-48.

Resp. de la Red.: Ne, ne estas eraro. Pri serioza entrepreno estas konsilinde informi sufiĉe frue, por ke ĉiu eventuala kandidato povu kolekti detalajn informojn, decidi pri partopreno kaj fari la necesajn preparojn, kiuj en ĉi tiu kazo povas tre longe daŭri.

ANEKDOTOJ KAJ SERCOJ

Natiuj Andris Ioĥanoviĉ el Petro-pavlovsk, Kamčatka, Sovetio — kaj pluraj aliaj legantoj sendis al mi anekdotojn kaj humuraĵojn, tradukitajn el diversaj nacilingvaj gazetoj kaj revuoj. Ili estas tre interesaj, sed ne koncernas Esperanton. Pro tio ni ne povas ilin publikigi, ĉar ni elektis kiel specialaĵo, aperigi nur tiajn sercojn kaj anekdotojn, kiuj estas ligitaj al Esperanto — do originalaj, ne tradukitaj el nacilingvaj periodaĵoj — kaj ILUSTRITAJ. Ni kore dankas pro la sendaĵoj kaj atendas lavangon de kontribuajtoj laŭ nia gusto.

FRATURBOJ DIVERSLANDAJ

En multaj landoj de la mondo nun estas fonditaj publikaj asocioj, kiuj helpas aranĝi amikajn rilatojn inter apartaj urboj de aliaj landoj, nomataj »fraturboj«.

Nur nia urbo Odeso, Sovetio, jam starigis amikajn rilatojn kun jenaj urboj: Varna (Bulgarujo), Seged (Hungarujo), Split (Jugoslavio), Aleksandrio (Egiptujo), Tripolo (Libio), Ĝenovo (Italujo), Jokohamo (Japanujo), Liverpolo (Britujo), Marsejo (Francujo), Oulu (Finnlando).

Ĉe ni jam laboras dek societoj de amikeco kaj tio estas nur la komenco. Sed... tiuj dek urboj, kiel vi scias, uzas diversajn lingvojn. Estas tute kompreneble, ke tiu multlingveco tre malhelpas la evoluon de frateco inter tiuj urboj. Jen bona agadkampo por esperantistoj. Ni devas per nia insista informado sieĝi tiujn societojn, klarigi al ili la avantaĝojn de unu komuna, neŭtrala lingvo. Kompreneble tio alportos ne malpli da gajno al nia movado.

Mi invitas esperantistojn el la cititaj dek urboj, kiuj estas pretaj kunlabori en tiu entrepreno, anonci sin al mi.

N. I. Sigal
Kirova 52, kv. 25
SSSR 270011 ODESSA — 11

Resp. de la Red.: Ni forte subtenas la iniciaton, ĉar multaj urboj lastatempe ĝemeliĝis kaj reciprokaj vizitoj ofte okazas. Bona tereno por organizi kampanjon. Ni alvokas ĉiujn esperantistojn aŭ societojn de la urboj ĝemeliĝintaj kun iu alilanda urbo, partopreni la kampanjon, kiun unu el la anoncigantoj devus gvidi je la nomo de IOE. Pro tio ni volonte akceptos ankaŭ sinpropozonon por gvidado de la kampanjo. Post la elekto de la gvidanto la Direkcio donos la necesajn konsilojn por komenci la kampanjon.

LETEROJ

Post kiam mi eksciis pri la ekzisto de Esperanto-Gazeto, mi tuj abonisin kaj jam varbis iujn abonantojn. Mi atendas malpacience kaj legas plezure ĉiun numeron. Dum la pasinta jaro al mi plaĉis pleje la artikoloj »La ekscita sepa jardeko«, »Malsato en la mondo« kaj »Konferenco en Lusako«. Mi dezirus estonte ankaŭ legi tiajn artikolojn.

Ankaŭ en artikoleto pri poeto Adamson vi represigis poemon lian, prenitan el Esperanta Antologio. Mia peto estas: de kie kaj kiel mi

povus havigi al mi la menciitan antologion?

Ĝerĉo Gambazov
Bulgarujo


Resp. de la Red.: Dankon pro la komplimentoj. Ni ĉiam ĝojas kiam ni legas aŭ aŭdas ke nia gazeto plaĉas al la legantoj. Al via demando estas malfacile respondi, Esperanta Antologio estas aĉetebla ĉe UEA por 13,35 nederlandaj guldenoj, sed el via lando vi ne rajtas sendi monon. Turnu vin al Bulgara Esperanto-Asocio eble ĝi povas iel helpi vin almenaŭ per konsilo.

EL LA MOVADO

INTERNACIA SEMAJNO DE AMIKECO EN BOLONJO

La Itala Fervojista Esperanto-Asocio kunlabore kun la loka grupo »A. Tellini« aranĝis grandan kaj vastan ekspozicion en la urbocentra subtera pasejo, per 3 grandaj kaj 3 malgrandaj paneloj kaj kelkaj murafiŝoj.

Granda estis la intereso vekita ĉe la preterpasantoj, kiuj ricevis falditajn flugfoliojn pri Esperanto kaj ĝia movado, kaj informojn pri la »Semajno«. Ankaŭ pluraj gramatikoj estas venditaj. Multaj estis la personoj kiuj petis informojn, buŝe, letere aŭ telefone, pri nia lingvo kaj kiuj ankaŭ aliĝis al la kursoj.



Unu el la paneloj

La lokaj gazetaro kaj radio raportis favore pri la ekspozicio. La ekspozicio, anstataŭ la programita unu semajno, daŭris pli ol tri semajnojn. Post ĝi du novaj kursoj komenciĝis, bone kaj regule vizitataj de pluraj personoj.

Jen bona ekzemplo kiel oni povas ĉiun okazon profiti por varbi novajn adeptojn.

Mario Amadei

MALGAJA DECIDO DE M. E. L.

Kun bedaŭro ni akceptas la informon ke la INTERNACIA BULTENO

DE MUZIKA ESPERANTA LIGO devos ĉesi aperi, ĉar la Ligo ne povas financi ĝian stenciladon. Krome la ĝisnuna Estraro de MEL en Ĝenovo restis nur Estraro de la itala sekcio. Nova Komitato estos elektita dum la planita MEL—Kunveno en Londono.

INTERNACIA KONKURSO DE INFAN-DESEGNAĴOJ

Centro de Esperanto Sabadell, str. Gral. Mola 99 — SABADELL (Hispanujo) invitas ĉiujn infanojn en la mondo partopreni per Esperanto ĉi tiun Konkurson okazonta en oktobro 1971 kunlabore kun la loka Sparkaso en la Universala Tago de la Sparo.

Desegnaĵojn oni povas sendi ĝis la 30-an de aŭgusto pri libera temo, sur blanka papero 21 x 29 centimetroj, kaj per kiu ajn tutkolora tekniko.

Ni kvitancos ĉiujn sendaĵojn kun eventuala kompenso.

Neniu desegnaĵo, premiita aŭ ne, estos redonita, kaj la ricevitan materialon ni disponigos por publikaj ekspozicioj.

Ni premios ĉiun aĝogrupon 4/6—7/9—10/12 per tri kvalitaj premioj kaj diversaj rekompencoj laŭ la partopreno.

NI FUNEBRAS

Kun ĉagreno ni publikigas ke du niaj fervoraj kunlaborantoj forpasis:

D-ro Evgenij Alekseviĉ Bokarev, akademiano, vortaristo, gvidanto de Esperanto-Sekcio en la Asocio de Sovetiaj Ligoj por Amikeco kaj Kulturaj Rilatoj kun Eksterlando. Estis kandidato por membreco en la Direkcio, sed ne povis akcepti la funkcion pro troa okupiteco, kvankam ricevis voĉon de granda plimulto.

Franjo Smerdel el Osijek, Jugoslavio, 56-jara, 40 jarojn esperantisto, longjara sekretario de la societo »Liberiga Stelo« en Osijek kaj »Fotoservo« de Primošten. Komisito de IOE por Primošten.

EN LA OKA DEKO DE NIA JARGENTO

En la Januara numero (1971) de »Esperanto«, la organo de UEA, aperis rimarkinda artikolo de Ivo Lapenna. Tre koncize, sed en strikte scienca formo, Lapenna prezentas al ni la Internacian Lingvon en la kadro de la sociologio. Pli malpli li diras jenon: ĉiu lingvo estas instrumento de interhoma komunikado kaj tial do Esperanto estas instrumento de la maskiganta internacia socio. Ĉar ĉio moviĝas en nia mondo, laŭ la mekanismo de kaŭzo kaj sekvo, ĉar tezo kaj antitezo kuniĝas en sintezon, kiu siavice prezentas novan tezon kun sia propra antitezo produktanta novan sintezon, ktp., necesas studi science tiujn fenomenojn, sed laŭ la propraj leĝoj de la sociaj sciencoj, ne laŭ tiuj de la natursciencoj. Tiun studadon faras CED, eldonante siajn studojn periode kaj aperigante krome la revuon »La Monda Lingvo Problemo«.

Kun ĉio ĉi tio ni estas plene akordaj. Ni avertu nur parenteze, ke la Hegel-an skemon de tezo-antitezo-sintezo ni ne konsideru leĝo kapabla antaŭdiri la estontecon. Oni povas per ĝi ekpliki la pasintecon, sed ĉar tezoj-antitezoj-sintezoj modifeblas per multoblaj influoj, nur post la rezultato de tiaj influoj ni vidos la veran skemon, la veran intertezan teksaĵon. Nu, CED laboras modele por nia movado kaj neniu neos, ke ĝiaj studoj kontribuis al la prestiĝigo de la internacia Lingvo en la superaj tavoloj de la socio*.)

En la dua parto de sia artikolo Lapenna argumentadas kontraŭ la senpacienco, kiu ekkaptis multajn el ni. Li atribuas la senpaciencon al la pesimismo pri la marŝo de nia afero, kio estas parte vero, sed samtempe la senpaciencon estas ja sufiĉe optimistaj, se ili volas serĉi novajn vojojn. Fakte estas, ke granda parto de la pesimistoj ĉiujare forlasas niajn vicojn, ĉu ni estu kontentaj pri tio, ke anstataŭ senpaciencaj ili fariĝis semintereuloj? La lingvo havas idean signifon kaj praktikan celon — diras tre prave Lapenna — kaj ni konsentas, ke la ĝusta formulo ne estas »aŭ... aŭ«, sed »kaj... kaj«. Mi eĉ dirus: kaj... kaj... kaj, t. e. ni devas ataki »de supre«, kiel tion faras CED kun siaj dokumentoj kaj kiel UEA tion faras ĉe UN, UNESCO ktp., ni devas ataki idee la tavolojn, kiuj respondas al ideaj stimuloj (sed mi suspektas, ke necesos modernigi nian idean arsenalon — pri tio alioĵaze) kaj ni devas nutri la ideojn per praktikaj avantaĝoj por la amasoj.

»Magiaj bastonetoj« certe ne ekzistas, pri tio ni, IOE-anoj, ne faris al ni iluziojn. Kion IOE fakte volas, IOE volas enuzigi, enplanti Espe-

ranton en la praktikan vivon de specialaj fakoj ĝis tiuj »oficialigas« la lingvon. Oni pli ol riproĉas al ni la vorton »Oficialigo« same kiel tiun de »Instituto«. Mi konfesas, ke al mi persone ankaŭ ne tre plaĉas la vorto »oficialigo« pro reklampsiologiaj kaŭzoj. Sed kiuj konsideras la vorton krimo, timas miaopinie, ke ni volas prilabori la »oficialajn« organizaĵojn tutmondajn: UN, UNESCO, registaroj, kiuj estas — kaj devas resti — rezervejoj de UEA kaj de la naciaj asocioj. Tia oficialigo neniam estis nia ideo. Ekzemploj de nia »oficialigo« aŭ »enuzigo« aŭ »enclantado« estas la Pupteatraj Festivaloj, entrepreno, kiun ni dankas al la Zagrebaĵ IOE-amikoj, alia ekzemplo estas la nunaj klopodoj ĉe la Skoltoj — espreble atingontaj plenan sukceson (klopodoj ne iniciatitaj de IOE). Kaj »Instituto«? Kion ĝi volas esprimi? Ĉu organizaĵon de eminentaj profesoroj? Se tio estas la ĝusta senco de la vorto, kial oni toleras kaj eĉ aŭspicias la »Instituto« por E-o en Komercio kaj Industrio, fonditan de tri komercistoj neprofesoraj? »Instituto« estas organizaĵo por studado de iu temo. En nia kazo ni studas la eblojn enpartikiĝi E-on ĝis »oficialigo« en diversaj rondoj, ĉu fakaj, ĉu sociaj, ĉu artismaj, ĉu sportaj, ĉu turismaj. Per »magiaj bastonetoj« ni nenion atingos, sed ankaŭ ne krucante niajn brakojn aŭ nur ripetante en prelegoj kaj kursoj grandparte eksmodiĝintajn frazojn. Necesas ataki la eksteran mondon el diversaj flankoj: supre, malsupre, sur ideo kaj sur praktika tereno.

Kial mi skribas ĉi tion? Ĉar harmonia kumlaborado de ĉiuj — kaj ĉiu sur sia posteno libervole elektita kaj interhelpante sin reciproke — povas multobliĝi niajn lamentinde tro etajn fortojn. Latina proverbo diras en Zamenhofa traduko: Konkordo malgrandajn kreskigas, malkonkordo grandajn ruinigas«. Tiu ĉi mia alvoko al konkorda kumlaborado de ĉiuj instancoj de nia movado direktiĝas kaj al niaj propraj vicoj IOE-anaj, kaj al UEA, kaj al la Naciaj Asocioj. Ĝi direktiĝas same al la paciencaj kiel al la senpaciencaj. Kaj, kaj, kaj!

Ernesto Sonnenfeld

*) Pri la »Monda Lingvoproblemo« oni permesu nur la rimarkigon, ke ĝi rezultas tre kosta pro siaj defecitoj, verproksime pro mistakso de la helpo, kiun oni esperis de Mounton & Kio, kiu akiris nur minimumon da abonantoj, deprenante 60% de ties abonpagoj, dum ĝi enkasigas 50% de la abonprezoj venantaj pere de UEA

MALLONGAJ INFORMOJ

ESTONIO. La 19-an de marto en estona radio parolis la ministro de klerigo, Ferdinand Eisen pri la klerigo en Estonio, dum 10—12 minutoj, en bona, klara Esperanto. Fine de sia parolado li menciis, ke Esperanto povas esti instruata en lernejoj ekde la 8-a klaso, se ekzistas instruisto, kaj ke nuntempe Esperanto estas instruata jam en 20 lernejoj de Estonio. (Laŭ informo de August Vellner).

La Radio de Soveta Estonio en Tallinn komencis (evidente eksperimente) disaŭdigojn en Esperanto. La 19-an de februaro mi aŭskultis tre bonan elsendon pri la kroniko de nia movado en Sovetio kaj pri estona muziko.

El tiu ĉi informo sekvas absolute klare, ke ni devas senprokraste (kaj kiel eble plej multnacie) direkti torenton de aprobaĵ, sugestaj kaj demandaj leteroj al Radio-Estonio Tallinn.

Vladimir Glazunov



S-ro Kotitsas, la instruanto en la Tesalonika Universitato, pri kiu ni informis en la pasinta numero.



Parto de la aŭskultantoj

FINNLANDO. Fervoja Abstinencia Asocio organizos por fervojistoj ĝis 35-jaraj kaj iliaj familianoj Internacian junularan semajnon (lingvoj: finna, sveda kaj Esperanta) en Pyhäntunturi, Finna Laponio (norde de la urbo Rovaniemi) 7—12 /8/ 1971 (ne 21—27 /8/ 1971). La aliĝkotiĝo kun plena pensio (gruplogiĝo) estos Mk 80,— pagota komence de la semajno.

Detelajn informojn: Rautatieläisten raittiusliitto, Rautatien posti, SF-00100 Helsinki 10.

KOLOMBIO. La ĉefurba ĵurnalo »El Espectador« en sia n-ro de la 25-a de marto raportas pri Esperanto lekcioj en la Filologia Fakultato de la Universitato Pontificia Bolivariana en Medellín al 50 studentoj kolektitaj el pluraj edukcentroj de la urbo.

(Informis Luis Guillermo Restrepo, komisiito pri korespondado de Esperanta Dialoga Asocio, Medellín)



(El »IMPULSO«, organo de Brazilia Esperantista Junulara Organizo)

Tiun ĉi ŝercon ni ricevis samtempe kun jena serioza informo de »Letero« n-ro 306:

»Nova esperantisto denaska. Naskiĝis al Iva kaj Lennart Aberg filo la 2-an de marto 1971. — Red. de Letero gratulas!«

Al tiu ĝis nun neokazinta fenomeno ankaŭ la Redakcio de Esperanto-Gazeto plenkore gratulas. Dum 20 tagoj malmultaj ellernis

Esperanton (La dato de »Letero« estas 1971—03—22), sed tuj post la naskiĝo ankoraŭ neniu.

KAMPANJO ESPERANTO EN SOCIAJN ORGANIZOJN


Amnesti-Internacio estas organizaĵo fondita por gardi la homajn rajtojn. Ni esperantistoj ja bone scias, ke en multaj landoj de la Tero la homaj rajtoj estas perfortitaj. Amnesti-Internacio prizorgas homojn, kiuj pro politikaj, rasaj, religiaj aŭ similaj kaŭzoj estas persekutataj. La organizaĵo i. a. helpas al familianoj de malliberigitaj, kiuj ja ofte ne disponas pri la necesaj rimedoj por sin vivteni; ĝi helpas ankaŭ per ĉiuj eblaj senperfortaj rimedoj faciligi la sorton de malliberigitaj kaj provas ankaŭ atingi liberigon. — Ĉar la laboro de Amnesti-Internacio disvolvigas preskaŭ nur sur internacia tereno, tiu organizaĵo urĝe bezonas internacian lingvon! Ni helpu! Nia laboro ĉe Amnesti-Internacio estos relative facila, ĉar jen estas vera bezono je internacia lingvo, krome la celoj de tiu organizaĵo sendube trovas la atenton kaj la aprobon de plejparto el la esperantistoj. Kun tiom da komunaj idealoj devus esti eble enkonduki Esperanton post relative mallonga tempo ĉe Amnesti-Internacio.

Kunlaborantoj de IOE, helpu, ke Esperanto baldaŭ faciligu konsiderinde la laboron de Amnesti-Internacio! Petu informojn pri Amnesti-Internacio ĉe:

Amnesty International
Internacia Sekretariejo
Turnagain Lane

Farringdon Street
London E.C.4, Britujo.

Petu informojn pri la laboro de Amnesti-Internacio, kaj demandu, kie vi povas trovi grupon en via proksimeco. Post ricevo de ties adreso, kontaktu kun la loka grupo de Amnesti-Internacio kaj rekomendu la uzadon de Esperanto, proponu kurson ktp. Pri viaj arandoj kaj ankaŭ pri eventualaj sukcesoj informu la gvidanton de la kampanjo, Manfred Föhner, Postfako 162, D-3340 Wolfenbüttel, F.R. Germanujo.




39-A
FOIRO DE
BARCELONO
3-A-13-A JUNIO
1971



Fariĝis jam tradicio ke la foiro de Barcelono aŭfias ankaŭ en Esperanto

ANONCETOJ

★ Mi estas 22-jara, dez. kor. kiel pri sporto, bigbita muziko kaj arto, interŝanĝi sondiskojn, librojn, revuojn k. bk. Studento de teatroarto, Petras Kulvinskis, Nevežio 16, RAGUVA, Panevežio r., Litovio, Sovetio.



• Elemer Kelemen, str. Florilor 9, SF. GHEORGHE, jud. Covasna, Rumanujo, interesigas pri fremdaj lingvoj, muziko, literaturo, sporto, turismo, bildkar- toj, diapozitivaj ktp.

• Janina Wierzechowska, str. Ogródowa 8, m. 15, SANDOMIESZ, Pollando, deziras korespondi ĉefe kun Jugoslavio.

• Vladimir Kasjjančik d. 34, kv. 20, AVDEJEVKA-3, Doneckaja obl., Sovetio.

• S-ino Aivi Kauber, Postkontor, Noudmiseni, HAAPSALU, Estonio, Sovetio.

• Edgard Homić, K. Libknehta 189, kv. 48, KRAS- NODAR-40, Sovetio.

KORESPONDA SERVO DE TEJO

... eldonas bultenojn kun adresoj de korespondemuloj. Bonvolu sendi anoncetojn menciante pri sekso, aĝo kaj interesigoj.

Ĉiu anonceto ricevos la bultenon.
Adreso de la servo: Koresponda Servo de TEJO

Toruń, Mickiewicza 6/10
(por Halina Magdycz)
Pollando

Per tio ĉi finiĝas la bezono aperigi anoncetojn en nia Gazeto. Ĉiu povas doni sian adreson kaj ricevi aliajn de la supra Servo.



Segu, fiŝeto, segu ĉi tie, ŝi ne komprenas Esperante.

Ofte oni aŭdas la opinion ke esperantistoj estas stranguloj, eĉ se ne rekte pro ilia esperantisteco sed pro aliaj hobiaj kiuj ilin igas ekstravagancaj kaj neordinaraj en alies okuloj.

Sed antaŭ ĉio ni pripensu, kion signifas esti »normala« homo? Ĉu ĝi estas persono griza, kiu per neniu sia eco elstaras, ne altiras la atenton de la ĉirkaŭaĵo? Homo, kiu ne estas menciinda pro io ajn alia ol pro sia ordinareco?

Se tiel, vivu la stranguleco!

Jam dum miaj unuaj kontaktoj kun Aŭstralio mi aŭdis ke en tiu lando la homoj sin dediĉas ekskluzive al mongajnado, kaj por nenio alia havas tempon. Poste, renkontante pli kaj pli da esperantistoj, mi konvinkigis ke tiu opinio estas tro supraĵeca. Ĝi fakte validas nur por parto, eble duono de la »novaŭstralianoj«, kiel oni ĉi tie kutimas nomi la enmigrintojn en la unua generacio. La ceteruloj — havas sian hobion, en singularo aŭ en pluralo.

Kompreneble, hobio ankoraŭ ne signifas strangecon nek elstaradon. Ekzistas hobiaj kiuj apartenas al ordinara aŭstralianoj. Tia estas ekzemple — kaj antaŭ ĉio — la biertrinkado. En Aŭstralio oni trinkas bieron kiel en Munkeno, ĉie kaj ĉiam. Sed precipe en specialaj ejoj nomataj »pub« (legu: pab), same kiel en Britujo, nur viroj, sidantaj kaj starantaj, malplenigas multajn botelojn, unu post la alia. Tio estas konsiderata grava socia aktivado.

Flegado de ĝardeno ĉirkaŭ la domo estas devo de ordinario kaj de strangulo, same kiel membreco en 2—3 kluboj, sportaj kaj aliaj.

Vetado je ĉevalkonkuroj estas preskaŭ nepre devo de »tipa aŭstraliano«, se tia entute ekzistas. Mi konis homojn kiuj je veto kaj trinkado sian tutan havaĵon perdis — aŭ simple neniam havis ion ajn pro ili.

Feliĉe mi konstatis ke inter esperantistoj tiajn mi ne trovis: jen la unua pruvo ke ili estas stranguloj!

Permesu ke mi prezentu al vi kelkajn el miaj renkontoj...

Fraŭlino **Dorothy Hasluck** (Hez-lak) estas el Novzelando kaj ŝi la unuan fojon vizitis Aŭstralion dum la unua mondmilito. Tie ŝi ekloĝis poste, gvidis entreprenon kaj emeritiĝis antaŭ pluraj jaroj.

En ŝia domo lokigita ĉe arbarando ekster Sidneo mi havis la bonŝancon gastigi dum mia unua restado en tiu urbo.

Sia hobio estas amo al la naturo kaj la homoj.

Ĉiun matenon je la 5-a horo ŝi ekpromenas tra la arbaro, naĝas en lageto, kaj revenas ĉirkaŭ la sepa, akompanata de la hundo de iu najbaro. Post matenmanĝo, ĉefe vegetara, ŝi legas, okupiĝas pri artoj, vizitas najbarojn. Ŝi eklernis Esperanton antaŭ kvin jaroj.

Doroti multe okupiĝis pri montgrimpado kaj kredas ke tiu aktivado havas nenian rilaton kun aĝo. Dum mi skribas tiujn ĉi liniojn, ŝi kun tri similaĝaj kunulinoj kampadas en Nepalo, sur la deklivoj de Anapurno, kaj verŝajne »promenas« sur la valoj de la neĝa giganto.

La unuan vesperon de mia restado ĉe f-ino Hasluck alvenis eta maljunmulino por intiti min al sia ĝardeno por vidi belegan floron de kaktio kiu floras nur dum unu tago jare. Mi akceptis la inviton kaj ne bedaŭris. La floro estis vere vidinda. Sed same inda estis la konatiĝo kun s-ino **Mary Bayle** (**Meri Bejl**).

Ŝi estas ĉ. 70-jara advokato, plene praktikas jagon kaj vojaĝis al Birmo por profundigi en budhanajn studojn. Pri tiu temo ŝi verkis du aŭ tri librojn.

Alia el ŝiaj hobiaj estas la amo al indiĝena flaŭro kaj faŭno. Kiam oni proponis al ŝi 60.000 dolarojn por ŝia arbara bieno, ŝi preferis donaci ĝin al naturprotektita institucio, kum la sola kondiĉo ke ŝi povu en ĝi loĝi dumvive.

Por povi senĝene gastigi natur-

amikojn, Meri konstruigis apartan domon kun ĉiuj bezonaĵoj, kiu estas ĉiam malfermita al vizitantoj por kelkaj tagoj aŭ semajnoj.

La invito al la hejmo de gesinjoroj **Chaldecot** (**Ĉaldekot**) en iu antaŭurbo de Sidneo ne antaŭdiris ion ajn notindan.

En la korto min akceptis juna sinjorino tre modeste vestita, nudpieda kaj kun malpuraj manoj. Evidente ŝi estis laboranta en la ĝardeno. Ankaŭ la samaĝa edzo havis similan eksteraĵon. Li estis riparanta iun laborilon.

Ambaŭ ne ĝenis sin tro pro mia ĉeesto, sed daŭrigis sian laboron. Tio kreis tujan atmosferon de hejme, ĉar, kompreneble, ankaŭ mi eniris la laboreton. Sekve ili surmetis ĉapelojn kun vualoj por prizorgi kelkajn abelujojn, kaj sinjorino Chaldecot manĝigis kelkajn anasojn, kaj banis ilin en eta baseno. Unu el la anasoj havis torditan bekon, alia lamis. »Jes, mi intence aĉetis ilin« diris s-ro Chaldecot, »la bredisto volis vendi ilin al buĉisto. Sed mi ne kredas juste ke oni mortigu ilin pro ilia korpa difekto. Ili ja ne kulpas pro tio! Do mi aĉetis ilin, kaj jen ili estas. Tion mi jam ofte faris«.


La tagmanĝo, kompreneble, estis vegetarana. La konversacio saltadis de temo al temo, ĝis kiam la dommastro eksciis ke mi konas la kulturon de la majaĵoj. Tiam li komencis elprenadi librojn, artikolojn, bildojn kaj dokumentojn, pri tiu temo. Kaj li mitralis min per trafaj demandoj dum du plenaj horoj.

Dum veturado en ilia »Volkswagen« oni ĉefe sidas sur kestoj, ĉar la sidlokojn ili elprenis: la sidlokoj estas nepraktikaj, ili ne permesas transporti iun beston aŭ keston... Krome, la majaĵoj ne havis eĉ tian aŭton!»

Dum veturado en ilia »Volkswagen« oni ĉefe sidas sur kestoj, ĉar la sidlokojn ili elprenis: la sidlokoj estas nepraktikaj, ili ne permesas transporti iun beston aŭ keston... Krome, la majaĵoj ne havis eĉ tian aŭton!»

TIBOR SEKELJ

AŬSTRALIAJ HOBIOJ



Kukabara, la ridanta birdo de Aŭstralio. S-ro Ray Chander studas la dialektojn de la birdoj.

Kiam s-ro **Ray Chander** eniris, la konversacio turniĝis al birdoj. Dum la proksimaj du horoj antaŭ mi paradis ĉiuj birdoj de la lando.

La hobio de Raj estas la birdoj, krom Esperanto, kompreneble. Frumatene, aŭ en malfrua vespero — foje eĉ tagmeze — oni povas trovi tiun diketan sinjoron kun blanka barbeto, kun portebla magnetofono en la mano, mikrofono fiksita al la pajla ĉapelo, algluitan al arbo aŭ al roko, aŭ kaŭrantan en iu fosajo. Li observadas la birdojn. Li kolektas iliajn voĉojn, zorge registras ĉion nekutiman, klasigas kaj komparas. Jam estas preskaŭ prespreta lia verko pri »la dialektoj de la aŭstraliaj birdoj«. Por tiu ĉi libro li jam havas eldoniston. Multaj konsideras lin strangulo. Eble li estas: li verŝajne ne trinkas bieron kaj ne vetas je ĉevaloj

La geedzoj **Lereveld** loĝas je unu-hora veturo de Melburno, en plena naturo. Ili ŝatas la pacan etoson de la arbaroj kaj solecaj vojoj.

Reveninte de insulo Filip, kien la geedzoj min veturigis por vidi pingvenojn, ili invitis min tranokti en ilia vasta domo.

La muroj de deko da ĉambroj, ĉambregoj kaj koridoroj surhavas vicojn da pentraĵoj, verkoj de s-ino Lereveld. La centoj da verkoj signifas plurlaran persistan laboron kaj montaras la evoluvojon de realismo al abstrakto. La saman evolulinon oni retrovas en multaj dekoj da ŝiaj ceramikaĵoj, kiuj ornamas ĉiun anguleton de la domo.

Cu ŝi iam prezentis ekspozicion? Ne. S-ino Lereveld neniam montris sian laboron al iu kompetentulo. Ŝi estas tro modesta por tio. Tamen, eble iun tagon...

S-ro Lereveld estas instruisto kaj eble tio estas ankaŭ lia hobio. Ĉar dum ili loĝis en Hobarto, Tasmanio, li enkondukis la oficialan instruadon de Esperanto en sian lernejon.

Ilia 20-jara filino laboras en kemia laboratorio, sed ŝia hobio estas la ĉevaloj. Ne, ŝi ne vetas kaj ne rigardas vetkuradon. Ŝia hobio estas la posedo de ĉevaloj. Nun ŝi posedas du. Unu bruna la alia nigra, paŝtadas en la herbokovrita korto, iom ekscititaj pro la ĉeesto de sia mastrino. Ŝi ne intencas vendi ilin. Nek interesas ŝin al kia raso ili apartenas. Nek ŝi estas fervora rajdantino. Ŝi simple ŝatas la ĉevalojn kaj ĝuas ilian posedon. Jen ĉio.

La hobio de ilia 25-jara filo estas vojaĝado. Li kun sia juna edzino aŭtostope aŭ alimaniere vagadas tra Aŭstralio kaj jam estis en multaj aliaj landoj. Ili kunvivis kun aliaj hipioj en kampadejoj, sur urboplacoj, trotuaroj. Kaj laboris kiam estis necese, ĉar ekde antaŭ nelonge la familio pligrandiĝis per hipi-bebo.

Kun s-ro **Jack Ryding** (**Ĝek Rajding**) kaj lia edzino mi renkontiĝis jam en Eŭropo dum unu el iliaj mondvojaĝoj. Sed ĉi-foje Jack atendis min ĉe la stacidomo de Dandenong, proksime de Melburno. Li gvidis min tra nutrajfabriko kiu min interesis kaj poste min kondukis al sia eta fabriko de laboriloj.

Unu el liaj kreaĵoj estas aparato por poluri etvalorajn ŝtonojn. Por elprovi tiujn aparatojn, kelkaj el ili konstante funkcias. La etvaloraj ŝtonoj polurigas. Sur la skribotablo troviĝas kelkaj skatoloj kun amaso da belaspektaj ŝtonetoj: »Bonvolu



Altvalora hobio: S-ro Ryding poluras juvelŝtonojn.



En sia hejmo en Kanbero s-ro Amies rakontas pri siaj aŭtoj. De maldekstre: D-ro Ross Robins, Lic. Tibor Sekelj, s-ino kaj s-ro Amies, iu studento kaj s-ro Raf Harry.

preni kelkajn«, s-ro Ryding proponas, kvazaŭ temus pri bombonoj. Poste li klarigas la nomojn kaj karakterojn de la bruna, la verda, la violkolora.

Poste s-ro Jack Ryding, kiu pasigis siajn unuajn du jarojn en Britujo, kaj la postajn 70 en Aŭstralio, veturigis min al sia hejmo. Vasta domo plena je memoraĵoj. Pri kiu ajn lando ni parolas, jen aperas aĵoj el ili: masko, gravuraĵo, ĉapo, ceramiko, ornamo...

Sed krom vojaĝado Jack havas ankaŭ alian grandan amon: poluri kaj kolekti altvalorajn ŝtonojn. Malantaŭ la domo staras negranda laborejo. En ĝi li demonstris al mi kiel oni facetigas la plej noblajn el la juvelŝtonoj. Li montris al mi ankaŭ plurajn skatolojn en kiuj sur velura fono kuŝis vicoj da akvamarinoj, safiroj, lapislazuloj, rubenoj, opaloj, kaj aliaj ŝtonoj kies nomojn mi ne memoras. Ĉiuj programoj poluritaj, foje kun mikroskopaj facetoj.

La alta valoro de la ŝtonoj ne tre zorgigas mian dommastron. Lin entuziasmigis ilia brilo, iliaj formoj kaj la proceso per kiu el senforma erco naskiĝas la juvelo.


Sinjoro **John Matasin**, kun la edzino, kiujn mi jam antaŭe renkontis en Eŭropo, gastigis min en Sidneo en sia domo, kiu superrigardas ĉarman golfon.

John estas vegetarano. Li ne nur firme kredas je naturkuracado, sed asertas ke la medicino kiel scienco estas fuŝaĵo, trompado kaj sintrompado. Ankaŭ li estas konvinkita pri internaj, kaŝitaj fortoj kaj kapabloj de homoj. Pri tio li havis plurajn personajn spertojn. Ekzemple foje li forlasis sian korpon, kaj lia dua mio agis tute aparte,

memstare. Similajn okazojn li travivis plurfoje, li diras.

Mia amiko John mangas kutime unu fojon tage: vespere. Sed foje pro veto li fastis dum unu semajno. Sed kiam la semajno finiĝis, li tiel alkutimigis, ke li daŭrigis la fastadon dum pliaj kvar semajnoj... ĝis kiam li estis nur osto kaj haŭto. Kaj verŝajne sufiĉe da spirito por postvivi.

Jen plua pruvo ke »ne mur de pano vivas la homo«.



S-ro Matasin kun sia edzino kaj unu el la nepoj

Sinjoro **William Amies** el Kanbero, posedas siajn aŭtojn. Sed la tagon kiam mi vizitis ilin, lia edzino devis reveni el la urbo per taksio.

Nu, eble el la ses oni povus ekfunkciigi almenaŭ du. Tamen, pri la ceteraj mi ne garantias. Nome lia hobio estas la malmovaj modeloj de aŭtoj. Laŭeble ili estu el la dudekaj jaroj, sed se li trovas iun postan modelon kun strangaj formoj laŭ nia nuna gusto, li certe aĉetos ĝin. Poste li pasigas semajnojn kaj monatojn riparante ĝin, fabrikante



RECENZOJ

o Rudolf Rakuša: **METODIKO DE LA ESPERANTO-INSTRUADO**, Gvidlibro por instruistoj de la Lingvo Internacia, eldonis Mladinska Knjiga Ljubljana (2-a, kompletigita eldono de INSTRUMENTO POR ESPERANTO, 1957). Formato 13 x 20 cm, 192 paĝoj, lukse broŝurita, blanka papero, pura preso. Eldonkvanto kaj prezo ne indikitaj.

Antaŭparolo de D-ro Peter Zlatnar, bedaŭrinde kun du ĝene superfluaĵaj artikoloj: »kiel la pasiva observanto« kaj »kiel la lia donaco«.

La verko havas 3 partojn: I. Kondiĉoj kaj problemoj (ecoj de la instruisto, lernanto kaj de la lingvo mem); II. Ĝenerala didaktiko; III. Speciala didaktiko aŭ metodiko. Ĉe la fino estas indekso de propraj nomoj kaj temoj.

Bonega lernolibro por instrui Esperanton en lernejoj, al infanoj fare de profesia instruisto. Bedaŭrinde ĝi ne traktas la instruadon al plenkreskuloj en societaj kursoj, kvankam la diferenco estas multe pli granda ol oni imagas. Ofte profesiaj instruistoj kaj profesoroj fiaskas en tiaj kursoj, ĉar ili deziras apliki lernejajn metodojn. Pri tio aperis serio de prelegoj en »Kajeroj« de Jugoslavio E-Instituto, kio povus servi kiel bazo por kompletigi la libron, tiel ke ĝi estu egale uzbla por ĉiu E-instruado kaj ankaŭ de neprofesianoj, kiuj instruas en kursoj, kaj kiuj la ĝeneralajn principojn de didaktiko povas trovi en ĉi tiu libro.

Parolante pri la metodoj, la aŭtoro ne mencias la plej modernan struktur-kompleksan metodon laŭ kiu la zagreba profesoro Guberina famigis internacie kaj sur kies bazo A. kaj T. Sekelj verkis la jam vaste konatan kaj en 20 landoj aplikatan strukturmetodon por Esperanto. Tiun kurson la aŭtoro mencias en piednoto, sed nur pro la aŭdvida karaktero, ne pro la ĉefa kvalito, ĝia strukturo. Ankaŭ la konatan strukturmetodon de Pettyn li ne mencias.

Malgraŭ tiuj mankoj la libro estas unika en sia speco kaj tre utila. Ĉiu kiu instruas Esperanton, devus ĝin posedi.

Sekanto

MASAKRO DE ESPERANTO

Kribrante supraĵe la dulingvan (franca-Esperanta) Bultenon n-ro 49 de Interretalata Centro Internacia de la Esperantistaj Kampadistoj, mi estis tiel ŝokita pro la abundo de lingvaj eraroj en la Esperanta traduko de la tekstoj, ke mi ne povis trovi pli adekvantan titolon.

Jen nur kelkaj ekzemploj:

— »senĉese ŝanĝas la aspekto de la naturo« (ŝanĝiĝas);

— »kies la Granda Sasso«;

AŬSTRALIAJ HOBIOJ (Fino)

mankantajn pecojn kaj fiksamte la pendantajn partojn de la karoserio.

Fine, se ĉio bone sukcesis, li eble eĉ veturigas sian »arkeologiaĵon«.



Doktoro Einihovici kaj lia edzino gastigis min en Perto en okcidenta Aŭstralio (la pertainoj neniam pardonis al mi ke ilia urbo ne troviĝas sur la Mondmapo!). Pri ili estas menio stranga, tamen mi volas ilin enmeti en tiun ĉi mian hobikronikon.

Li estas 76-jara, kaj ŝi en siaj bonaj sesdekaj. Tamen ili estas gejunuloj. Frumatene ambaŭ eliras al la maro por magi. Poste li, otolaringologo, veturigas al sia ordinaro. Li decidis ke li laboros ĝis sia lasta tago, ĉar sen laboro por li ankaŭ la ludoj ne estas ĝuindaj. Intertempe la agema kaj temperamenta sinjorino Einihovici butikumas, tenisludas, partoprenas kunvenon de iu virina societo aŭ gvidas tridekon da pacientoj el mensmalsanulejo per aŭtobuso tra la urbo, por amuzi ilin. Gustatempe ŝi preparas la tagmanĝon.

La posttagmezon la geedzoj pasigas kune. Ili tenisludas, kegloludas, partoprenas Esperantan studron-

— »ĝis la valono „Sasso Barisano“ (traduko de franca »vallon« = valetoj);

— »ŝi estus al vi Ĉarman fianĉinon« kaj »ĉu vere vi deziras esti mian fianĉinon?«;

— »ŝajnis ke la duko multobligis la okazon« (plioftigis);

— »Galanta, Harold estis ridetanta al sia fianĉineto.« (kial ne simple: ridetis?);

— »Harold same vivis revon« (kion signifas: vivi revon?);

— »li estos iĝinte angla reĝo« (en la franca teksto estas: »li estos angla reĝo«);

— »la granda dukejo estos en akordo...« (duklando ne estas dukejo);

— »la normanda dukto diris, ŝajnigante granda amikeco« (supre estas kelkaj superfluaĵaj akuzativaj finaĵoj por ĉi tie!);

— »ĉu ĉi opinias ke jam urĝas tempo dum ni parolos pri gravaj aferoj?« (jam urĝas ke ni parolu pri...);

— »pere la du reĝoj (pere estas adverbo kaj ne povas esti uzata prepozicie, kial ne simple: per la du reĝoj?);

— »al mia prodo la plej bona« (al mia plej bona prodo);

— »mi ĉin heredigos la anglan tronon« (neeblaj du akuzativoj, kial ne: mi testamentos al ĉi la anglan kronon?);

— »Defendi min ne povas nun... tiel estis la prezo de tiom da ridetoj« (kiu ne povas?, mankas la subjekto;... tio estis la prezo);

— »Haroldn« (jen nova speco de akuzativo!);

— »je fremda akcento milde petis«, »respondis je klara voĉeto« kaj »respondis je fremda akcento« (je ne povas kiun ajn prepozicion anstataŭi kiam ajn, speciale ĝi ne taŭgas por anstataŭi per);

— »Vi ŝajnas malĝoja, monsinjoro? — marmurpetis apud li, voĉeto maltrankvila« (la frazo tute ne esprimas peton, do: rimarkis, aŭ demandis — ĉar estas demando);

— »Grave ofendigita, Harold respondis: Ne!« (ofendita);

— »Tamen la patrino kortuŝita ŝin plendis; sed reĝino de Anglujo... ŝi restis superŝutita je mil zorgoj« (kion signifas ŝin plendis?; sed kiel reĝino; per mil zorgoj);

— »ĉu Dio mia« (ĉu ne ekzistas en Esperanto, sed ho!);

— sur du paĝoj du fojojn aperas ŝia anstataŭ ŝia: »ŝi eniras la mangoĉambron, per ŝia eta mano ektuŝas la blondan hararon de la princo«, »kiam ekvidiĝis la Hispana (devus esti: hispana) marbordo, ĉirkaŭita de ŝia ploranta akompanantaro, la terena (mi ne scias kion signifas tiu vorto, en la originalo sur tiu loko estas menio), pura knabineto formortis (mortis)«.

Ktp, ktp. Eĉ la titolo estas erara »TRA PASANTE NORMANDION« kie prefikse uzata prepozicio estas aparte skribita.

Kion oni diras al tradukisto kiu tiajn erarojn farus en sia lingvo tradukante el iu fremda? Ĉu iu publikigus tian fuŝtradukon?

don, faras vizitojn kaj akceptas vizitojn de geamikoj.

Vespere la aktivado daŭras senĉese. D-ro Einihovici ĝis post nokto-mezo rigardas la televidan elsendon de sportaj eventoj.

Iun vesperon en la hejmo de gesinjoroj Einihovici mi havis kunvenon de 25 geesperantistoj. La preparo kaj servado de teo estis afero ĉefe de la dommastrino. Kaj kiam oni diras »teo«, en Aŭstralio oni pensas »teo ktp. ktp.«

Mi sentis min tre inspirita en la hejmo de gesinjoroj Einihovici. Mi estis impresita pri ilia energio, kaj estas certa ke ili ankoraŭ multajn jarojn ne »emeritiĝos«.

Kial esperantistoj toleras tian kaĉon?

Ĉiu revuo devus havi lingvan redaktoron, kompetentan kaj respondecan pri la lingva korekteco de la artikoloj. La scio de komencanto ne sufiĉas por aperigi publikajn destinitajn ankaŭ al legantoj kies nervoj ne ĉiam estas ŝtalaj. Feliĉe la franca originalo estas apude kaj almenaŭ kiu scias france, povas kompreni pri kio temas. Sed kiam rolon havas tiam la »Esperanta« traduko? La nomo de la tradukinto ne aperas, kvankam ĝi devus esti videbla, ĉar tia kuraĝulo meritas laŭdojn — almenaŭ pro sia kuraĝo.

A. Sekelj

o Turisma Kalendaro de TEJO, simpatie prezentita broŝurita kalendaro de eventoj por la esperantista junularo dum 1971 kun resumoj en franca, angla kaj rusa lingvoj.

o S. E. U. — 9. Somera Esperanto-Universitato, Gyula, Hungarujo, 4—10 (7) 1971. Plaĉa dulingva broŝureto (Esperanta kaj hungara) kun detala programo de S. E. U. Havebla ĉe: Somera Esperanto-Universitato, 48-as u. 11, Gyula, Hungarujo.

o STARTO n-ro 2 por 1971, organo de ĉefa E-Asocio, kun varia interesa enhavo, bedaŭrinde, parte nacilingva.

o Esperanto aktuell, germanlingva informilo pri Esperanto, eldonata en Nurnbergo, komence de ĉi tiu jaro estas dulanda, ĉar Aŭstria Esperanto-Movado farigis kuneldonanto. Bonega ekzemplo de kunlaboro inter du landaj organizaĵoj kun sama nacia lingvo, por plialtigi la eldonkvanton kaj malpli koste informi la neesperantistan publikon sur pli granda teritorio.

o Bonvolmesaĝo de la junularo de Kimrujo okaze de Bonvoltago, la 18-a de majo 1971, aperis kiel dukolora plurlingva faldfolio kun Esperanto sur la ekstera paĝo.



Jen, feliĉe venas la tria etapo!

ORA LISTO DE I. O. E. por aprilo 1971

1. S-ino Dorothy Henderson,	Kanado	US \$ 1349,70
2. F-ino Betty Salt,	Kanado	„ „ 962,40
3. H. Scheffler,	F. R. Germanujo	„ „ 286,93
4. Hans Werner Grossmann,	Svisujo	„ „ 116,24
5. M.,	Italujo	„ „ 81,20
6—7. Felix Epstein,	F. R. Germanujo kaj	
Ernesto Sonnenfeld,	Urugvajo, po	„ „ 75,—
8. Arne Pedersen,	Danujo	„ „ 70,70
9. Gian Carlo Fighiera,	Belgujo	„ „ 56,—
10. Miloslawa Kolinska,	Pollando	„ „ 50,71

Plej proksimaj kandidatoj: A. N. (F. R. Germanujo 46,17), A. kaj T. Sekelj (po 41,70), V. Kruusalu (34,08), J. Matasin (31,—), Hans Bakker (filo) (30,63), ing. J. Dettwiller (25,12), Ludoviko Demesmaeker (23,—) Zaga Milosavljeviĉ (21,80), Koloman Novak (16,75).

DIREKCIA KONFERENCO

Kiel jam anoncite, ĉi-jare la Direkcia Konferenco kun partopreno de perantoj, aliaj funkciuloj kaj aktivuloj de IOE okazos en du partoj (la unua ĉefe por tiuj kiuj ne povas vojaĝi al Belgujo).

LA UNUA PARTO okazos en Gyula (Gyula), Hungarujo, de la 21-a ĝis la 23-a de julio. Pensiono en dulita ĉambro en moderna hotelo kostas 120 forintojn tage. Estas dezirinde kiel eble plej frue rezervigi litojn ĉe: SOMERA ESPERANTO-UNIVERSITATO, 48-as u. 11, TIT, Gyula, Hungarujo. Kopion de la sinanonco aŭ informon sur simpla poŝtkarto pri la partopreno bonvolu sendi samtempe al la adreso de A. Sekelj (sur la dua paĝo).

LA DUA PARTO okazos en BRUSELO, Belgujo, de la 27-a ĝis la 29-a de julio, en la hotelo »Les Acacias« (Avenue Fonsny 6). En la sama hotelo (antaŭ la Suda Stacidomo) la prezroj estas:

1 — persona ĉambro	sen duŝo 245 BF (ĉ. 5 US \$)
	kun „ 305 „ („ 6 „)
2 — lita ĉambro	sen „ 435 „ („ 8,60 „)
	kun „ 500 „ („ 10 „)
ĉambro kun dupersona lito	sen duŝo 385 BF (7,70 US \$)
ĉambro kun dupersona lito	kun duŝo 450 BF (9 „)

La prezroj inkluzivas imposton kaj servon, sed ne matenmanĝon (37 BF = 0,74 \$). La kvartalo estas plena je restoracietoj malmultekostaj. En la hotelo mango kostas ĉ. 100 BF (2 \$) sen trinkaĵoj.


Sinanoncon sendi al s-ro Gian Carlo Fighiera, 13, rue de la Reinette B-1000 BRUXELLES-1 (ne al la hotelo) — kun kopio aŭ samtempa informo al A. Sekelj, (kiel supre), ĝis la 10-a de junio.

PROVIZORA PROGRAMO

- Ambaŭ partoj havos la saman programon:
- 1) Jarraporto kaj diskuto pri la raporto.
 - 2) La stato de la unuopaj kampanjoj kaj taskoj por la venonta periodo.
 - 3) Financoj.
 - 4) Eldona aktivado kaj Esperanto-Gazeto. Rolo de la perantoj.
 - 5) Rolo kaj agadmaniero de la landaj komitatoj (komisionoj) kaj komisiitoj.
 - 6) Novaj ideoj kaj konkludoj. (Pri la novaj ideoj kaj konkludoj de la Unua Parto diskutos ankaŭ la Dua Parto; pri la movaj ideoj kaj konkludoj de la Dua Parto pri kiuj la Unua Parto ne diskutis, okazos posta skriba voĉdonado. Definitiva programo fiksota ĉe la malfermo de ĉiu konferenc-parto.



La unua E-kurso en Provadia, Bulgarujo, post kiu fondiĝis la societo »Oveĉ«.



Multaj niaj novaj legantoj starigis la demandon: Kiel ni povas bombardi per paperkanonoj la celojn kiuj aperis antaŭ kelkaj jaroj en numeroj kiujn ni ne havas? Sendu al ni liston de pli frue aperintaj adresoj.

La Redakcio decidis ripeti aron da adresoj aperintaj en la rubriko »Paperkanonoj« antaŭ kelkaj jaroj — petante rekomenci la pafadon, tiel ke ĉiu leganto skribu ĉiunonate al kelkaj el ili EN ESPERANTO postulante informojn laŭ la karaktero de la adreso.

Victorian Govt. Tourist Bureau »VICTOUR«, 272, Collins Str. MELBOURN, Aŭstralio.

Oberösterreichisches Landesfremdensverkehrsamt, Hauptplatz 9, LINZ, Aŭstrio.

REISE-BÜRO »ADRIA«, Burggasse, 1070 WIEN, Aŭstrio.

Landesfremdenverkehrsabteilung des Amtes der Steiermärkischen Landesregierung, Herrngasse 16, A-8011 GRAZ, Aŭstrio.

Commissariat Général au Tourisme, Gare Centrale, BRUXELLES 1, Belgujo.

Société Nationale des Chemins de fer belges, BRUXELLES, Belgujo (pri uzo de Esperanto ĉe la fervojoj).

Secretaria de Turismo do Estado da Guanabara, Rua São José 90, RIO DE JANEIRO, Brazilo.

Tours Department, Peltours Ltd., 29, Duke Street, LONDON, W. 1., Britujo.

COVENTRY CORPORATION, Public Relations Department, Council House, COVENTRY, Britujo.

BALKANTURIST, Placo »Lenin« 1, SOFIA, Bulgarujo.

CEDOK, Praha, Ĉeĥoslovakio.

CEDOK, Bratislava, Ĉeĥoslovakujo.

Hotel Dania, SILKEBORG, Danlando.

Turista Asocio, Mikonkatu 15 A, HELSINKI, Finnlando.

Matkatoimisto Kaleva Oy, Eerikinkatu, TURKU, Finnlando.

Bureau National de Renseignements de Tourisme, 127 Av. des Champs-Élysées, PARIS 8-ème.

Agence HAVAS, 13 place Masséna, F-06 NICE (Alpes Mar.), Francujo.

Fremdenverkehrs- und Kongress-Zentrale e V., HAMBURG 1, F. R. Germanujo.

Deutsche Reichsbahn, Amt für internationalen Personenverkehr, FRANKFURT/Main, F. R. Germanujo (pri fervojoj).

Deutsche Reisebüro, Friedrich-Engelsstrasse, PIRNA/Sa, Germana Dem. Resp.

Reisebüro der DDR, Ernst-Thälmann Str. 22, DDR 801, DRESDEN, Germana Dem. Resp.

Chemins de fer de l'Etat Hellénique, ATHENES, Grekujo (pri fervojoj).

Subsecretaria de Turismo, MADRID, Hispanujo.

Hotel SIMON, str. Garcia Vinuesa 21, SEVILLA, Hispanujo.

Fővárosi Idegenforgalmi Hivatal 5, Roosevelt tér 5, BUDAPEST V., Hungarujo (turismo).

IBUSZ, Szécsényi tér 9/11, PECS, Hungarujo (turismo).

PELTOURS, P.O. Box 394, TEL AVIV, Israelo.

TOURING CLUB ITALIANO, Corso Italia 10, MILANO, Italujo.

Ente Provinciale per il Turismo, Piazza Duomo 5, PARMA, Italujo.

El Paperkanonoj 1—20

Tourist Information Center, Kyoto Tower Bldg, Higashi-Shiokojicho, Shimogyo-ku, KIOTO, Japanujo.
JAPAN NATIONAL TOURIST ORGANIZATION,
Head Office, 1. Marinouchi, TOKYO, Japanujo.

»PUTNIK«, Turistagentejo Dragoslava Jovanovića 1, 11000 Beograd, Jugoslavio.

»PUTNIK«, Preobraženska 6, 41000 ZAGREB, Jugoslavio.

CANADIAN PACIFIC HOTELS, Conventions and Sales Division, Room 284, Windsor Station, MONTREAL, Kanado.

Ministerio de Edicacion, LA HAVANA, Kubo.

V. V. V., Stationsplein 45, ARNHEM Nederlando (turismo).

Fremdultrafika Unuiĝo A. N. V. V., Parkstr. 38, DEN HAAG, Nederlando.

A/S LARVIK-FREDRIKSHAVNFERJEN, Postbox 2443, OSLO 2, Norvegujo (turismo).

Turistkontoret, N-1700 SARPSBORG, Norvegujo.

Tourist and Publicity Department, P.O. Box 95, WELLINGTON, Novzelando.

Komitato por Turismo, Litewska 2/4, WARSZAWA, Pollando.

JUVENTUR, Alej Róz 2, WARSZAWA 61, Pollado.

ONT Carpati, SIGHISOARA, Rumanujo (turismo).

Oficiul National de Turism »CARPATI«, Bul. Gheorghiu Dej nr. 2, BRASOV, Rumanujo.

INTURIST, Prospekt Marksa 16, MOSKVA, Sovetio.

INTURIST, str. Gagarini 27, TALLINN, Estona SSR, Sovetio.

Sveda Turistoficejo, Hamngatan 27, STOCKHOLM, Svedujo.

Turistbyran, Drottningtorget, GÖTEBORG C, Svedujo.

Offizielles Verkehrsbüro, CH-8590 ROMANS-HORN, Svisujo.

Schweizerisches Verkehrshaus, Lidostrasse, CH 6000 LUZERN, Svisujo.

Exploitation des Chemins de fer d'Etat de la République Turque, ANKARA, Turkujo (fervojoj).

New York Convention and Visitors Bureau Inc., Pershing Square 90, East 42nd Street, NEW YORK, N. Y.

Servo por Propagando kaj Turismo, Pelikaanstraat 6, ANTWERPEN, Belgujo.

Radio Muritiba, Esperanto-elsendo, MURITIBA, Brazilo.

Radio Stoke-on-Trent, Esperanto-elsendo, STOKE-ON-TRENT, Britujo.

Radio Sofia, Esperanto-elsendo, Bul. »Dragan Cankov« 4, SOFIA, Bulgarujo.

Radio Bratislava, Esperanto-elsendo, BRATISLAVA, Ĉeĥoslovakio.

Direction Générale des Chemins de fer de l'Etat Danois, KØBENHAVN K., Danujo.

Matkotoimisto Area o/y (Vojaĝoficejo), Kauppakatu 18, JYVASKILÄ, Finnlando.

Syndicat d'initiative, 1, Cours du XXX juillet, BORDEAUX, Francujo.

Verkehrsamt Berlin, Fasanenstr. 7/8, 1 BERLIN 12, F. R. Germanujo.

Radio Bilbao, Esperanto-elsendo, Apt. 1117, BILBAO, Hispanujo.

Hotel »EUROPA«, SIÓFOK, Hungarujo.

Ferrovie Italiane dello Stato, Servizio Commerciale e del Traffico, ROMA, Italujo (Fervojoj).

KVARNER EXPRESS, Maršala Tita 192, 51410 OPATIJA, Jugoslavio.

Radio Zagreb, Jurišićeva 4, 41000 ZAGREB, Jugoslavio.

KLM — Propaganda departemento, Leidsplein 1—3, AMSTERDAM Nederlando.

Pola Radio, Box 46, WARSZAWA, Pollando.

Malmö Turistbyro, Skeppsborn 2, 21120 MALMÖ, Svedujo.

Chemins de fer fédéraux suisses, BERN, Svisujo (fervojoj).

DONACOJ AL LA FONDUSO »OFICEJO«

Zagorka Milosavljević, Jugoslavio — — \$ 2,—
Nikola Nikolov — Roko, Bulgarujo — — \$ 1,35

El F. R. Germanujo:

A. Bolle	— — — — —	\$ 0,14
A. Stephan	— — — — —	\$ 1,53
K. Schönrich	— — — — —	\$ 13,96
M. Murath	— — — — —	\$ 3,14
O. Peine	— — — — —	\$ 0,41
A. N. —	— — — — —	\$ 11,33
F. Schurad	— — — — —	\$ 0,41
R. Schöner	— — — — —	\$ 2,79
E. Thimm	— — — — —	\$ 6,34
J. Schmid	— — — — —	\$ 0,83
H. Zwirkirch	— — — — —	\$ 3,—
F. Liebl	— — — — —	\$ 0,52
R. Wluka	— — — — —	\$ 1,39
A. Dopp	— — — — —	\$ 2,79
H. Schütt	— — — — —	\$ 5,58

El Svisujo:

F. Bierhoff	— — — — —	\$ 0,29
H. Ith	— — — — —	\$ 2,51
K. H. Mischler	— — — — —	\$ 0,29
H. Schmutz	— — — — —	\$ 2,51
W. Schaufelberger	— — — — —	\$ 1,37
D. Hemmann	— — — — —	\$ 1,14
G. Weigelt	— — — — —	\$ 2,06

Antaŭe kvitancita — — — — — \$ 1022,37


Entute \$ 1086,70

DONACOJ AL LA GENERALA KASO

Petr Mutafčiev, Bulgarujo	— — — — —	levoj 5,—
L. Dovat, Svisujo	— — — — —	\$ 0,29
A. H. Inselmann, F. R. Germanujo	— — — — —	\$ 0,41
F. Vogel	— — — — —	\$ 1,39
F. Liebl	— — — — —	\$ 2,79
H. Scheffler	— — — — —	\$ 81,97
A. Dopp	— — — — —	\$ 0,41
J. Windisch	— — — — —	\$ 0,41

NOVA SUBTENANTO POR 1971

Hans Schütt, F. R. Germanujo



La vivo tamen estas agrabla kun
ESPERANTO-GAZETO

PERANTOJ

Argentino: Hugo A. Lingua, Casilla de Correo 278, ROSARIO

Aŭstralio: Kenneth G. Linton, 11 Poplar St., SOUTH CALFIELD, Vic. 3162. Abono: \$ 2,—

Aŭstrujo: Aŭstria Esperanto Movado, Hofburg, Bathyanystiege, A-1014 WIEN.

Belgujo: »HEROLDO DE ESPERANTO«, 13 rue de la Reinette, Bruselo 1., Abono 100 b. fr.

Brazilo: Alfredo Enio Duarte, Caixa Postal 18 (Esperanto) ZC OO, RIO DE JANEIRO, E-GB; kaj KULTURA KOOPERANTIVO DE ESPERANTISTOJ, Avenida 13 de Maio, 47 Sl. 208 RIO DE JANEIRO. ZC-06

Britujo: Brita Esperanto Asocio, 140 Holland Park Avenue, London, W 11.

Bulgarujo: Petr Ivanov Mutafčiev, ul. Persenk, bloko 20-A, SOFIA-7, tel. 62 18 24; kaj Jordan D. Kalinov, Bul. »G. Dimitrov«, bl. »Debeljanov« A-20, RUSE. — Tel. 25877. Abonprezo 5 levoj.

Ĉeĥoslovakio: Jos. V. Otta, Vančurova 34, ŠUMPERK Jarabono 44 Kĉs. kaj DOVOZ TISKU, Praha 2 Vinohrady, Vinohradská 46.

Danujo: Ing. Uwe Lohse, str. Bakkesvinget 5, 3400. TULSTRUP/Hilrd. Postgirkonto 14 41 16. Abono DK 14.—

Finnujo: Joel Vilkki, SOMERO-9.

Francujo: F-ino Germain Kiertz, 5 bd des Alliés, F-68 MULHOUSE; Pék STRASBOURG No 993.48. — Abono: F 12,50.

Germana Feder. Resp.: Manfred Führer, Postfach 162 D-3340 WOLFENBÜTTEL; posttekkonto: Karlsruhe 1154 71.

Grekujo: Kimon G. Eliopoulos, 130 El. Venizelos str. NOVA SMIRNA — ATHINAL. Tel. 931-214.

Hindujo: Hinda Instituto de Esperanto, P.B. 604, NEW DELHI-1.

Hispanujo: Juan-Luis Vallés, Apartado 7018, BARCELONA. Abono 140 pesetoj.

Hungarujo: Hungara Esperanto-Asocio, Kenyérmező u. 6, BUDAPEST VIII.

Israelo: Ben-Alter Jehiel, P.O.B. 379 PETAH TIKVA Ab. 6 liroj. Posttekk. Bank Hadoaz 445854-8.

Irlando: Pat O'Reilly, »Woodbine«, Bluebell, Dublin 12.

Italujo: Dott. Giovanni Marchiori, Via Cantore 15 (Gal-

leria Astra), 37100 VERONA. Abono 1.200 Liroj, postgirkonto n-ro 28/22942.

Japanujo: Internacia Fako, OOMOTO, Kameoka, Kioto-hu

Jugoslavio: IOE, 11000 BEOGRAD, Lole Ribara 14 & 608-8-1353-10. Abono 20 din.

Kanado: W.D.B. Hackett 326 Soudan Ave, TORONTO 7. Ont.

Kubo: Raúl Juárez Sedeno, Apartado 570, CAMAGÜEY.

Madagaskaro: Eugène Ravéloson, Boite Postale 1678, TANANARIVO.

Meksiko: F-ino Margarita Nájera S., Apartado Postal N-9310, MEXICO-1-D. F.

Nederlando: Ing. D. Klage, Talingstr. 8., SCHOORL (NH). — Abono 7,50 hfl al Boerenleenbank Schoorl (NH), Kto 5082 R.

Norvegujo: Eldonejo Esperanto A/S (Esperantoforlaget A/S), Box 942, OSLO 1., Postgirkonto 100.31.

Novzelando: J. T. Allan, 12 Lonsdale ave., RONGOTAI, WELLINGTON 3.

Pollando: S-ino Miloslawa Kolinska, Sopočka 2/2, SZCZECIN

Portugalujo: D-ro A. César Anjo, Av. 28 de mayo 12, VISEU.

Rumanujo: Maria Vitályos, C, postala 14, TIRGU SECUIESC, jud. Covasna.

Sovetio: Ivan Palkin, ul. Televidenija d. 7, kor. 3, kv. 44, MOSKVA M-449.

Johannes Palu, Sölmle 21, TALLINN 16.

Panas Vasilčenko, Postkesto 375, KIEV 24. Abonprezo 4 rub.

Svedujo: Gerhard Nyqvist, Johan Skyttes väg. 5 JÖNKÖPING. Postgirkonto 89 299.

Svisujo: Claude Gacond, Miéville 133, CH-2314 LA SAGNE. Abono 9 Sv. Fr.

Usono: Conrad Fisher, R.F.D. No. 1., MEADVILLE, Pa. 16335.

Venezuelo: Prof. J. E. Bachrich, Aptdo. 146, VALENCIA, Edo. Carabobo.

El ĉiuj aliaj landoj perantoj serĉataj. Perantoj ricevas 20%-an rabaton por kovri la kostojn.

ABONPREZO: 2 dolaroj aŭ egalvaloro

VISOKO C


(Alta C)

TRINKAJO POR KONSERVI LA SANON

La unuan fojon sur la jugoslavia merkato ni havas puran, naturan orangŝukon **ALTA C**, Kiun produktas la entrepreno

NAVIP

Tiu natura orangŝuko montrigis neanstataŭigebla rimedo por konservi la sanon, laborforton kaj fresecon. **Gi estas speciale rekomendinda por infanoj, patrinoj, sporti-**



stoj, pli aĝaj personoj, homoj kiuj laboras kun fortostreĉo, do, al ĉiuj.

Unu glaso da **ALTA C** sufiĉas kiel taga bezono de la organismo kaj oni devas ĝin trinki dum al antaŭtagmezaj horoj.

Ĉiu botelo de la suko **ALTA C** enhavas ĉiujn vitaminojn kaj aliajn utilajn elementojn de 2 kilogramoj da elektitaj orangfruktoj.

GARANTIO: ĉiu botelo de la suko **ALTA C** enhavas: 280 mgr da vitamino C, 0,50 mgr da bioflaonido (hesperidino).